

La Espero

1996:1

Svedujo. *Sveda Esperantista Societo* fondiĝis en Stockholm vespere la 1-an de decembro lasta, sub la prezido de doktoro S. E. Krikortz. Ĉeestis riprezentantoj de la kluboj esperantistaj en Stockholm, Uppsala, Falun, Eskilstuna, Karlshamn, Malmö kaj Södertelge kaj de granda nombro da solaj esperantistoj en la plej diversaj partoj de Svedujo. Deklaracioj

oni aliĝe al la nova societo krome estis en senditaj de la esperantistaj kluboj en Nyköping, Orienta Gotlando kaj Helsingborg.

Kiam la prezidanto estis elektita la kunvenantojn, oni elektis sekretariojn por la kunsido sinjorojn teol. kand. Gunnar Löfvenmark el Uppsala kaj P. Ahlberg en Stockholm.

Poste la kunsidantoj formale decidis sin kunligi societe kaj ke la societa nomo estos Svede: "Svenska Esperantoförbundet" kaj esperante: "Sveda Esperantista Societo".

Kiam la societo post longa kaj pridetala diskutado estis fiksinta la regularon societara, ĝi elektis provizoran komiteon por la intertempo ĝis la proĝima societa kunsido ĝenerala, konsistantan el sekvantaj societanoj:

Prezidanto la malnova esperanta protagonisto sinjoro Waldemar Langlet, *sekretario* sinjoro P. Ahlberg, *vicprezidanto* sinjoro doktoro S. E. Krikortz, kaj *kasisto* inĝeniero Engelbrekt Olson, al kiuj la societo komisiis la plenumadon de la societaferoj, sinjoroj poŝtekspeditoro Karl Holm, teologia kandidato Gunnar Löfvenmark kaj filozofia kandidato K. Eriksson el Uppsala, direktoro H. S. Hermod en Malmö, studianto Albert Östberg en Falun,

Redaktion:

Agneta Emanuelsson
Kaisa Hansen (red. sekreterare)
Franko Luin (teknisk redaktör)
Bengt Nordlöf

Frågor om prenumeration o. dyl.:

Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

E-post: espero@esperanto.se

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi, Tyresö

Tryck: Rönnquist & Co, Sollentuna

Prenumeration 1996: 150 kr.

Gåvoprenumeration till utlandet: 80 kr.

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlems-
avgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,

Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
tel. 08-34 08 00, fax 08-34 08 10

E-post: sef@esperanto.se<http://www.esperanto.se>

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider
dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 1996:

Direktansluten medlem 150 kr.

Familjemedlem (utan tidning) 60 kr. Ungdomsmedlem
(max 20 år) 60 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt
medlemmar i Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund
och får dess tidning *Kvinpinto*.

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

Telefon: 08 - 34 08 00

Fax: 08 - 34 08 10

Postgiro: 578-5

Telefontid: Samma som Esperanto-Centro Stockholm.
Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Styrelsens ordförande: Tomas Jansson,
Seminariégatan 3 A, 752 28 Uppsala

**Förlaget andelsägare kallas till års-
möte i Katrineholm lördagen den
11 maj 1996, kl. 9.00.**

La Espero estas presata  sur recikligita papero.

Språkdebatt

I samband med esperantokongressen i Katrineholm 10-12 maj 1996 kommer en paneldebatt om språk i Sverige och EU att ordnas fredagen den 10 maj kl. 9.30 - 11.30. **Kenneth Larsson**, särskild utredare i Statsrådsberedningen av svenskan i EU, kommer att fungera som debattledare. I panelen återfinns **Anna-Lena Bucher**, TNC, terminolog, Stockholm, **Ernst Brunner**, författare, Stockholm, **Sylvia Karlsson**, studieledare för invandrarundervisningen i Katrineholm, professor **Christer Kiselman**, Uppsala universitet, **Ågnes Morardini-Harrach**, språklärare och ungersk-svensk tolk vid parlamentet i Budapest, **Birger Schlaug**, politiker, miljöpartiet, och **Veli Tuomela**, Centrum för tvåspråkighetsforskning, Stockholms universitet.

Tusentals tolkar

Det är ett stort antal frågor som man kan ställa sig i samband med Sveriges inträde i EU. Hur klarar Sverige behovet av tolkar och översättare i EU? Finns det tillräckligt med svenska tolkar och översättare i Sverige? Har vi för få språk att välja på i skolorna och behöver hemspråkundervisningen utökas?

De medlemmar som talar ett minoritetsspråk har rätt att använda det enligt EUs regler, men det är inte alltid

som det finns tolkar och översättare till alla språken. Hur kommer det att se ut i EU när även östländerna går med?

Pappersåtgången i EU är enorm och för att översätta ett 25-sidors dokument från engelska till sex andra språk behövs det 100 dagar och det kostar cirka 1000 kronor för varje sida och för vart och ett av språken. Ett kontor i EU gör av med tre ton papper på en dag och allt överflödigt papper körs bort en gång i veckan med långträdare vilket gör att miljöfrågan blivit högst aktuell.

Kanske ett brospråk?

Finns det alternativ som kan minska kostnaderna för användandet av alla språken i EU? Vilka? Kan ett enda s.k. brospråk ersätta alla de andra?

Dessa och andra frågor av liknande karaktär kommer man att försöka belysa under de två timmar som debatten är tänkt att pågå. Diskussionerna sker egentligen utanför esperantokongressens program, men icke desto mindre berikar de vår kongress i och med att de berör frågor som vi själva diskuterar nästan till vardags. Har du möjlighet att vara i Katrineholm redan på fredagsmorgonen, var med. Debatten sker på Stadshotellet i salen Strykjärnet; journalisten Maya Gilmbay är den som registrerar det hela.

INTERNACIA SUKCESO!

ETIMOLOGIA VORTARO
DE ESPERANTO

de Ebbe Vilborg

Volumo 4 furoras

Prezo: 150 kr
plus sendkostoĵ

Eldona Societo Esperanto
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm
Postgiro 578-5

Katrineholm väntar på dig



Den 10–12 maj håller Esperantoförbundet årskongress i Katrineholm. Ortens centrala läge och lättillgänglighet vad gäller kommunikationer, i samband med ett rikt kongressprogram – allt bådär för en välbesökt kongress.

SEF fyller 90 år i år och lite av det kommer att märkas i Katrineholm. En speciell utställning håller på att tas fram och kommer att finnas på plats. SEFs första ordförande Valdemar Langlet kommer härifrån och detta kommer att uppmärksammas på olika sätt.

John Wells, UEAs ordförande fram till i somras, blir vår främsta gäst och kommer att kåsera om vårt sätt att tala – det är han expert på som en av världens främsta specialister på fonetik. Bl. a. får vi höra vad utmärker svenskar när de talar främmande språk: esperanto, men även engelska.

Agneta Emanuelsson, ordförande i kongresskommittén har tänkt sig att vi ska bekanta oss med det nya sättet att informera, via internet (se artikel om det längre fram i tidningen). Vad det innebär exakt vet vi inte än, men det låter spännande och nytt.

Från Ungern kommer Agnes Morardini-Harrach, lärare på Langletskolan

PRELIMINÄRT KONGRESSPROGRAM

Fredag

- 9.30–11.30 Paneldebatt om språk med bl.a. Anna-Lena Bucher, Ernst Brunner, Sylvia Karlsson, Christer Kiselman, Agnes Morardini-Harrach, Birger Schlaug, Veli Tuomela (*se separat artikel*)
- 15.00 Mottagningen på stationen börjar fungera
- 16.00 "Kongresejo" öppnar
- 18.00 Middag
- 19.00 "Interkona vespero" med sång och dans. Sallad

Lördag

- 08.00 Frukost
- 09.00 Eldona Societo Esperanto – årsmöte
ILEI - årsmöte
- 10.30 Kaffe
- 11.00 SEJU – årsmöte (*ev. fortsättning efter lunch*)
Stadspromenad
- 12.00 Lunch
- 13.00 Kongressens högtidliga öppnande
- 14.15 Esperantoförbundets årsmöte
- 16.15 Kaffe
- 16.30 Föreläsning av prof. John Wells, f.d. ordförande i Universala Esperanto-Asocio
- 18.00 Middag (för dem som inte ska ha bankett)
- 19.00 Bankett
- 21.00 Musik och dans

Söndag

- 08.00 Frukost
- 08.30 Föreläsning av Agnes Morardini-Harrach
- 09.30 KEI bjuder på gudtjänst
- 10.30 Kaffe
- 10.45 Auktion
- 12.15 Kongressens avslutning
- 12.30 Lunch
- 13.30 Utflykt till Valdemar Langlets Lerbo och Spetebyhalls slott (ca 3 timmar)

i Budapest och berättar om Langlets senare verksamhet, som Rödakorsrepresentant under 2:a världskrigets slutskede.

Inkvartering på Stadshotellet

Kongressdeltagarna kommer att bo på Stadshotellet där 2 övernattningar med alla måltider fr.o.m. middag på fredagen och t.o.m. lunch på söndagen kostar 1280 kr per person (125 kr per natt

tillkommer för enkelrum, dvs 250 kr för två nätter).

Kongressavgiften betalas separat. Anmäler man sig före 15 april är kongressavgiften 200 kr, efteråt 300 kr. SEJU-medlemmar betalar bara 100 kr. Se särskild beställningsblankett för övriga priser.

För SEJU-medlemmar har man ordnat logi på annat håll för 110 kr per natt.

Kryssa på blanketten vad din betalning avser och glöm inte namnet!

Bussar och flyg till Prag

Esperantoförbundet har förberett några resealternativ för dem som reser till UK i Prag i sommar. Man kan välja flyg eller olika bussalternativ.

Flyg från Stockholm eller Köpenhamn

Esperantoförbundet har bokat ett antal platser på flyget till Prag från Stockholm resp. Köpenhamn fredag den 19 juli och måndag den 28 juli för återresan. Notera dagarna!

Priser t.o.r.: från Stockholm 2200 kr, från Köpenhamn 1900 kr. Billigare än SAS Jackpot! Anslutningsflyg till/från Arlanda resp. Kastrup går att ordna.

Obs! Antalet platser är mycket begränsat. Ring därför Esperanto-Centro redan idag (tel. 08-340800) eller faxa (08-340810) och reservera.

Gruppresa med buss från Malmö, inkl. hotell

En bekväm chartrad buss utgår från Malmö den 19 juli och kör till Prag via Limhamn/Drögår, Gedser/Grossenbrode, Berlin (middag och övernattnings) och Dresden. I Prag är bussen framme på lördagen, och finns till förfogande under kongressveckan. Hemresan startar den 27 juli med övernattnings i Rostock. Hemkomst till Malmö dagen efter c.a kl. 16. Se f.ö. även annonsen.

I priset 4 325 kronor ingår bussresa, två övernattnings i Tyskland och sju övernattnings på Hotel Olympic Garni i Prag (hotellet finns med i *Dua Bulteno*). Vissa måltider ingår också. Du kan bo i enkelrum för 1300 kr extra.

Förhandsboka redan nu! Bussen har plats för 35 resenärer. Ring Esperanto-

Centro (tel. 08-340800) eller faxa din reservation (08-340810). Alla anmälda får en detaljerad resplan. Under resan kommer det att finnas tid för rejäla bensträckare.

Individuella bussresor

Bussbolaget Eurolines kör reguljärtrafik två gånger i veckan från Stockholm/Göteborg till Prag via Trelleborg/Sassnitz (se turlistan här nere till vänster). De angivna priserna är rabatterade, men kräver inget minimiantal resenärer. Hänvisa bara till Esperantoförbundet och annonsen i *La Espero*.

Om du vill åka tillbaka från en annan ort än Prag, eller ett annat land, säg till när du bokar biljetten. Ett annat pris kan gälla, förstas. Eurolines kör till många städer i Europa.

Ordna direkt med bussbolaget, tel. 020-98 73 77.

F·L·Y·G

Stockholm-Prag eller Köpenhamn-Prag

Avresa fredag 19 juli
Hemresa måndag 28 juli

Flyg billigt och unna dig några extra dagar i Prag!

2 200 kr från Stockholm
1 900 kr från Köpenhamn
[tur och retur]

ESPERANTO-CENTRO

Tel. 08 - 34 08 00
Fax 08 - 34 08 10

PRAGO 96

UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO 20 - 27 JULI 1996

Anmälningsavgifter i svenska kronor

Kategori	till 96-03-31	efter 96-04
Direktmedlem i UEA (ej MG)	1200	1435
Icke direktmedlem i UEA	1500	1780
Medföljande, handikappad eller ungdom (under 30 år 1 jan. 96) som är direktmedlem i UEA	600	725
Medföljande, handikappad eller ungdom (under 30 år 1 jan. 96) som inte är direktmedlem i UEA	900	1075

Handikappassistenter och ungdomar födda efter 31 december 1975 betalar ingen kongressavgift. I händelse av kursändring kan kongressavgifterna komma att justeras uppåt.

Anmälningsblanketter för kongressen kan beställas hos Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby, tel. 0415/50 152. Blanketten skickas ifyllt tillbaka till samma adress. All betalning sker till postgiro 14 74 29-5, Esperanto-förbundet, Specialkonto.

Bussbolaget Eurolines kör två gånger per vecka till Prag. Här är deras turlista för Stockholm-Praglinjen.

Avresa onsdag/lördag	Ort	Från Prag torsdag/måndag	Pris t.o.r.
10.00	Stockholm	18.40	1116 kr
10.30	Södertälje	18.10	1116 kr
11.20	Nyköping	17.30	1116 kr
12.25	Norrköping	16.30	1116 kr
13.00	Linköping	15.55	1116 kr
15.00	Huskvarna	14.35	999 kr
16.10	Borås	13.00	999 kr
17.10	Göteborg	12.00	999 kr
19.10	Halmstad	09.55	999 kr
20.10	Helsingborg	09.05	882 kr
21.00	Malmö	08.15	882 kr
21.30	Trelleborg	07.45	882 kr
13.00	Prag	15.30	

SEF jubileas en 1996

En 1906 la esperantistoj de Svedio opiniis, ke la sveda esperanto-movado estas tiom forta, ke estas bezonata tutlanda organizo. Ekzistis proksimume deko da kluboj en la lando, kelkaj kun jam longa tradicio, aliaj tute novaj, kaj aro da unuopaj esperantistoj.

Kaj tiel okazis, ke en decembro 1906 estis fondita Sveda Esperantista Societo (ĝi poste ŝanĝis la nomon al Sveda Esperanto-Federacio). La unua prezidanto fariĝis *Valdemar Langlet*, kiu pli frue estis la unua prezidanto de la Esperanto-klubo de Upsalo, dua en la mondo.

La estraro estis tutlanda. Estis en ĝi *H. S. Hermod* el Malmö, fondinto de la fama korespondista instituto, *Albert Östberg* el Falun, du upsalanoj, nome *Gunnar Läfvenmark* kaj *K. Eriksson*, *Edvin von Sché-*

ele el Ronneby, *Birger Ström* el Härnösand kaj *John Lundgren* el Hedemora.

La ĉiutaga gvidado estis tasko de kelkaj stokholmanoj: la vicprezidanto *S.E. Krikortz*, frua kaj tre aktiva esperantisto, la sekretario *P. Ahlberg* kaj la kaskisto *Engelbrekt Olson*.

El la estraranoj pluraj ludis tre gravan rolon en la historio de SEF, ekzemple *John Lundgren*, kiu gvidis la organizon post la Ido-krizo kaj atentis, ke ĝi restu esperantista, dum *P. Ahlberg* elektis la la idisman flankon kaj id-igis la tiaman movadan gazeton *Esperantisten*, kies redaktoro li estis.

Tiu gazeto ankaŭ estus 90-jara ĉi-jare, se ĝi ankoraŭ ekzistus. Ĝin fondis la klubo de Stokholmo, kie la movado ĝuste tiam estis tre vigla. Pluraj aktivuloj

de la upsalaklubo ekloĝis en Stokholmo, i.a. *Paul Nylén* kiu fariĝis ĵurnalisto ĉe *Stockholms-Tidningen*, kaj tio estis rimarkebla en la kluba vivo.


La unua numero de *Esperantisten* aperis en januaro 1906 kaj granda optimismo spiris el ĝi. En 1905 okazis nome la unua esperanto-kongreso en *Bulonjo-sur-maro* kaj montris la internacian uzeblon de esperanto.

Esperantisten ne havis longan vivon, kaj malaperis eĉ pli rapide ol Ido mem kaj estis anstataŭigita unue de *Sveda Esperantisto* de *John Lundgren* kaj fine de la nun jam plenaĝa *La Espero*.

Ĝi kaj SEF daŭre vivas kaj aktivis, kiel vi bone scias.

Franko Luin

Res till esperanto-kongressen i Prag i sommar



Passa på att vara med på esperantokongressen i Prag i sommar! Samtidigt kan du njuta av Tjeckiens unika huvudstad som är full av europeisk historia. Den gyllene staden är förtjusande med floden Vltava och alla vackert utsmyckade broar. En underbar utsikt får du från det gamla slottets höjder. Välkommen!

19 – 28 juli

Pris: 4.325:-

I priset ingår:

Resa i modern helturistbuss, sju övernattingar på Hotel Olympic Garni i Prag, övernattingar i Tyskland på ut- och hemresan, samt färjeöverfarter. Inkvartering sker på mellanklasshotell. I Prag ingår frukostpension och i Tyskland halvpension. För den som önskar erbjuder vi anslutningar med tåg eller buss från hela Sverige. Resan utgår från Malmö.

Bokning och information: ESPERANTO CENTRO
telefon 08-34 08 00, telefax 08-34 08 10

Teknisk arrangör:
Scandopartner
Specialresor,
Malmö

http://www.esperanto.se

Malantaŭ ĉi tiu kriptita "adreso" kaŝas sin tute nova informa sistemo de SEF. Kiel vi povis legi en pli frua numero de La Espero, SEF nun havas retadreson (sef@esperanto.se). Al ĝi estas ligita la ebleco havi propran "inform-ejon", kaj tion SEF utiligas plene.

Nu, kiel funkcias la informejo de SEF? Homoj kun komputoroj, modemoj kaj aliro al la interreto ("internet" por neesperantistoj) skribas la supran adreson kaj sur ilia ekrano aperas, post ioma atendo, la ĉefpaĝo de SEF. Tiu paĝo estas esence nur enhavtabelo pri tio, kion oni povas trovi je tiu adreso. La enhavo estas dividita en kvin grupojn por pli facila orientiĝo.


Kio estas esperanto?

En la unua grupo la retumanto povas trovi respondon al sia demando, kio estas esperanto. Estas tie trovebla mallonga ĝenerala prezento, sed ankaŭ, ekzemple, "Man har sagt mig", la artikolo de Claude Piron, kiu emocie argumentas por esperanto, kaj artikoloj de Christer Kiselman kaj Ingemund Bengtsson.

Sub alia titolo oni trovas aron da demandoj - kaj respondoj - kiujn homojn faras pri esperanto. En ĉi tiu grupo oni povas ankaŭ konatiĝi kun esperanto-teksto. Estas ĉi tie legebla "Krizo en mia ĝardeno", de Sten Johansson, kiu aperis pasintjare en *La Espero*. La sveda kaj esperanta tekstoj aperas paralele unu apud la alia por tuja komparo.

Aktualaj informoj

En la dua grupo oni trovas aktualajn informojn pri esperanto kaj la esperantomovado. Reviviĝas ĉi tie *Esperantonytt*, la svedlingva informfolio, kiu ĉesis aperi antaŭ deko da jaroj. Oni trovas en



ĝi mallongajn informojn pri esperanto tutmonde kaj enlande.

En ĉi tiu grupo estas ankaŭ informoj pri aktualaj aranĝoj, ekzemple la programo de la sveda kongreso en Katrineholm, kaj informoj pri UK en Prago. Ankaŭ la vojaĝebleco al Prago estas troveblaj tie.

Tiuj, kiuj interesiĝas pri lingvoj ĝenerale povas trovi en ĉi tiu grupo mallongajn informojn pri lingvoj en la mondo (<http://www.esperanto.se/lingvoj.html>) kaj ligojn al aliaj prilingvaj informoj.

La movado

Plia grupo temas pri esperanto-organizaĵoj, unuavice pri SEF kaj SEJU, sed ankaŭ pri membreco en UEA. Eblas aliĝi retroŝte al SEF kaj SEJU (sed ankorau neniu eltrovis tion).

Precipe rigardindas la informejo de SEJU (svedlingva je <http://www.esperanto.se/seju/>; esperantlingva je <http://www.esperanto.se/eseju/>), kolorriĉa kaj varia (vidu bildon).

En ĉi tiu grupo ankaŭ la lokaj grupoj kaj unuopaj esperantistoj prezentas sin. Nur du grupoj havas jam proprajn informojn (Stokholmo - tre eleganta kaj trilingva! - kaj Tyresö), sed jam anoncis sian baldaŭan aliĝon ankaŭ kelkaj pliaj. Ĉu via klubo?


Kiel lerni esperanton


La informejo devas ankaŭ doni informojn kiel lerni esperanton. En la kvara grupo estas troveblaj tiaj informoj: per kiuj libroj komenci, kie okazas kursoj (Karlskoga kaj semajnfinaj kursoj), kie oni povas aĉeti librojn kaj simile.

Sed plej grava en ĉi tiu grupo estas la retkurso de esperanto (<http://www.esperanto.se/retkurso.html>), farita laŭ la leterkurso de Ingemar Nordin. Laŭ ĝi la retumanto povas lerni la bazon de la lingvo, fari kelkajn ekzercojn kaj mem kontroli sin, sed ankaŭ rete sendi siajn solvojn de la taskoj kaj rete ricevi ilin kun komentarioj.

Ĉi tie estas ankaŭ trovebla konciza svedlingva prezento de la tuta gramatiko de esperanto (<http://www.esperan-

La informejo de SEJU celas gejunulojn deklarklaraj kaj funkcias jene: per klakpremo al bildsimboletoj oni lokigas informerojn en ajna el la fenestroj kaj la bildeto reaperas kiel bunta bildo, kun esperanto-vorto. Oni ricevas informeron pri SEJU kaj lernas novan vorton. Oni devas sekve mem aktivi por ricevi la informojn, eĉ mem eltrovi, al kio klakpremi.





to.se/helagram.html>), kaj ligo al la pli ampleksa gramatiko de Bertil Wennergren.

Macintosh-posedantoj povas senpage preni demonstran version de la komputora sveda-esperanta vortaro (<<http://www.esperanto.se/svespdemo.html>>) – kaj rete mendi la plenan version, se ili deziras tion.

Utilaj informoj

En la lasta grupo estas kunigitaj kelkaj praktikaj ligoj al aliaj informoj, unuavice al la *flavaj paĝoj*, de kie oni pluiras al la aliaj esperantaj informoj. Sed troviĝas ĉi tie ankaŭ kolekto da kantotekstoj, *Kreskanta kantaro* (<<http://www.esperanto.se/kreskant.html>>), laŭ la iama iniciato de Sven Alexandersson, Salex; anonctabulo, nomata ĝuste *Tabulo* (<<http://www.esperanto.se/tabulo.html>>), kie oni povas senpage retanonci: kaj esperantaj tiparoj senpage preneblaj (<<http://www.esperanto.se/tiparoj.html>>), kaj por Macintosh- kaj por Windows-komputoroj. Tia tiparo

La informejo ne nur donas informojn pri esperanto kaj la esperantomovado, sed ankaŭ provas varbi membrojn, ekzemple per aliĝilo, kiun eblas sendi retpoŝte al SEF.

La sesleciona retkurso estas bazita sur la leterkurso de Ingemar Nordin. Ĝi donas al la retumanto la bazan konon de esperanto kaj instigas lin interaktive testi siajn konojn.



estas nepre bezonata, se oni volas legi la esperantajn tekstojn kun korektaj literoj.

Jam internacie anoncita

La informejo de SEF estas trovebla en multaj internaciaj registroj, eĉ tiaj, kiuj kontrolas la kvaliton antaŭ ol ili akceptas registigon. En Svedio la centra registro de Sunet postrestas en sia laboro je minimume kvaronjaro; iam somere la esperantaj informoj estos troveblaj ankaŭ tie.

Kiel utiligi ĉi tiun "informobankon"?

Havi informojn estas sensignife, se ne ni scias pri ĝi. Estas same kiel publikigi luksan broŝuron en multegaj ekzempleroj, sed forgesi distribui ĝin. Tial gravas, ke ni informu pri nia ttt-adreso [ttt estas la esperanta versio de la angla *www*: "world wide web" fariĝas "tut-tera teksaĵo"].



Loka agado povas ankaŭ trovi forumon en la interreto, kaj oni povas jam legi en ĝi pri Stokholmo kaj Tyresö. La iniciato povas veni de kiu ajn klubamembro, ne nepre de la klubamestraro. Tiel okazis pri la informejo de Esperanto-Centro Stokholmo, iniciatita de Berit Posthuma.

Sendu la informon pri la adreso <<http://www.esperanto.se>> al viaj gimnazioj (ili scios, kion fari per ĝi!), kaj proponu, ke ili provu la returson, nur kiel teston por scii, kion ili opinias pri ĝi. Kaj ne timu proponi tion al klasoj, kiuj ne studas lingvojn. Ili komprenos tion kiel komputado. Intereson havus ankaŭ la lokaj bibliotekoj, kiuj havigis "internetingulon".

Sed ankaŭ private vi povas havi utilon de tiu kono. Se vi – simile kiel tre multaj homoj – ne havas aliron al interreto, sed konas amikon, najbaron aŭ laborkamaradon kun aliro, petu, ke vi rajtu rigardi, pri kio temas. Tio povas konduki al plia interparolo pri esperanto kaj – kiu scias...

Se vi skribas artikolon, ĉiam aldonu informon pri la ttt-adreso. Eble ĝi eĉ povas esti taŭga deirpunkto por artikolo?

Franko Luin

Eduko danĝeras

Harold Brown: *Eduko danĝera* kaj aliaj teatraĵoj. Eldonejo Ulekso, Högsby 1995. 151 p., 100 SEK.

"Eduko danĝera" estas ok teatraĵoj de Harold Brown kun du liaj tradukoj: dramigo de "La maristo" de S.T. Coleridge kaj traduko de "La fluto" de Agnes Bogh-Høghsted. Estas krome kelkaj kantoj por teatraĵoj. La teatraĵoj estas jam prezentitaj kelkloke en Eŭropo. La aŭtoro ricevis, kune kun Kerstin Rohdin, du premiojn de UEA por "Infanlibro de la jaro" pro tradukitaj libroj de Astrid Lindgren.

Petro en *Rigardu antaŭ ol salti* kritikas stultan burokratismen de departementoj, obstinecon kaj nekomprenon de homoj. Petro ankaŭ plendas pri la egoismo de homoj. Ĉu Petro volas hel-

pi Arturon mortigi sin mem? Komika situacio kutime venas el serioza problemo. *Vagabondo* filozofiumas ĉarme. Li vekas kaj stimulas aktivecon de nia pensado. Kiu volas morti kiel hundo?

"Mortigu ĉiujn, kiuj scias legi kaj skribi"

La sceno de *Eduko danĝera* montras kaptitan personon, kiu spegulas unu flankon de la franca revolucio, en malliberejo. La titolo kaŝas satiron kaj kritikon. "Li scias legi kaj skribi ... Mortigu ĉiun, kiu scias legi kaj skribi. ... jes, nun oni traktas la literaturon serioze ... oni mortigas pro ĝi ..." Li estas nur sekretario de grafo, kiu jam estis forigita de la popolo, kaj oni mortigos lin iom poste. Lia monologo avertas kaj memorigas

min, ke inter la revolucio 1789 – 1799 kaj la nuntempa skandalo, la afero Rushdie, ne tiom diferencas. Kio estas revolucio kaj evoluo de homoj?

En *La prelego* preleganto klopodas trovi sencon de homa ekzisto: "... en suna dimanĉa mateno oni povas forigi el la mondo alian vivantan estaĵon, personon kun propra historio, propraj pensoj, sentoj, ideoj ... kiu estas same grava kiel vi mem ... kaj la naturo, kaj la homaro reagis al tiu malapero per nenio, pli ol momenta tremo de kelkaj ondoj..."

"Niaj vivoj fariĝos trankvilaj kaj mildaj kiel kareso"

Sed en *Li enlitiĝas, li leviĝas* fine li trovas iom da konsilo: "... kiam alvenos ĝusta momento, mi ripozos; mi aŭdos la voĉojn de anĝeloj; mi vidos, ke la ĉielo estas garnita per diamantoj; ni vidos, ke ĉiuj malbonoj en la mondo, kaj ĉiuj niaj suferoj droniĝos en la kompatato, kiu kovros la teron, kaj niaj vivoj fariĝos same trankvilaj kaj mildaj kiel kareso." Lia ŝerco, kiu povus sufoki religiajn homojn, tamen amuzigus legantojn. Ankaŭ lia okcidenta vivmaniero ridigos orientajn virojn, kiuj neniam povus imagi sin helpantaj sian edzinon en kuirado.

En *La pesto* "li" priskribas panikon de homoj en pestoregata regiono: "... Eble en la fino oni linĉos homojn pro tio, ke tiu portas ruĝan hararon aŭ bluan ĉemizon!" "Ŝi" priskribas la lastajn momentojn de diversaj homoj: dignajn kaj malestimindajn mortintojn. "La rezulto de ambaŭ estas samaj ... La diferenco estas la stilo." Kritikon, suferon, tragedion kaj morton la aŭtoro povis speguli trankvile, digne kaj bele.

Mutfilma scenaro *Hamleto* estas interesa, ĉar ĝi donas melankolian impreson al mi, kiu vivas en temporapide ŝanĝiĝanta epoko en ĉio.

Ankaŭ *Edipo* estas tia, ke la leganto mem povus esti Edipo, kaj cerbumas, mem kreas propran Edipon leginte la teatraĵon.

Malgraŭ kelkaj prezeraroj oni facile povas kompreni. La alia estas, ke la akuzativo postulas cerbumon ĉe legantoj. La tekstoj uzeblas por esperantokursanoj. Traleginte la libron mi sentis helan kaj tutecan optimismon de la aŭtoro. Sed eble aliaj trovos la malon.

Boomee Kim-Lindblom

Satsa friskt!

Esperantoförlaget behöver öka sitt andelskapital för att ge ut nya läro-, ord- och läseböcker, romaner, bokkassetter mm. Du kan hjälpa till: antingen genom en egen insats eller genom att få din förening engagerad! Det finns andelsbevis till värdet av 500, 1000 och 10 000 kronor. Din förening, och du själv, får teckna hur många bevis som helst.

Esperantoförlaget
Vikingagatan 24
113 42 Stockholm
postgiro 578 - 5





Denove ekspozicio en Älvsjö

Tridek mil instruistoj venis al "Skolforum", kvartaga ekspozicio en la granda foirhalo en Älvsjö, Stokholmo. "Esperanto" aperis grandlitere sur la fono de nia stando. Ni montris lerno-

librojn kaj vortarojn. Ni ankaŭ informis pri klaso 9a en la lernejo de Hjulsta, la klaso, kiu studas esperanton por fari vojaĝon al Gresillon en aprilo 1996.

Artikolo en la metroa ĵurnalo *Metro* pri la Hjulsta-projekto aperis en la unua tago de la ekspozicio. Multaj vizitantoj legis la artikolon antaŭ ol ili venis al Älvsjö kaj pluraj venis al nia stando ĝuste pro tio. Ne estis hazardo, ke la artikolo aperis ĝuste en tiu unua tago.

La informtabuloj interne de nia stando estis pretigitaj de Kaisa Hansen. Anita Bergh kaj la instruisto de la lernejo de Hjulsta, Gun-Britt Plöninge.

Roland Lindblom deĵoris ĉiutage, Bengt Nordlöf kaj Janko Luin deĵoris po unu tagon, Kaisa Hansen du tagojn kaj ankaŭ respondecis pri la muntado de la ekipaĵo kune kun Ole Hansen.

Rezulto kaj efiko ne montras sin tuj, sed ni konstatis, ke niaj dialogoj kun scivolemaj instruistoj estas multaj kaj pro tio sulfiĉaj por nova partopreno post tri jaroj.

Ni disdonis minimume 2 500 informpetkartojn. Tiaj kartoj nun troviĝas por distribuado al vi aktivuloj en la lando. Mendu ĉe EC!

TRA LA LANDO

Esperanto-Centro flage salutas

Esperanto-Centro en Stokholmo per flagetoj montras, kiam ĝi estas mallfermita. Similaj flagetoj povas indiki esperanto-aktivadon ankaŭ en aliaj lokoj.

Ĉiu klubo bezonas minimume du flagetojn, ĉu ne? Tiaj flagetoj estas tre oportunaj ĉe ekspozicioj, sed ankaŭ ekster hazarda ejo, kiam vi aranĝas specialan kunvenon.

Ili povas pendii ekstere eĉ kiam pluvigas, ĉar ili estas el bonkvalita plasto. Kun la flagetoj sekvas tenilo kaj eĉ ŝraŭboj, per kiuj fiksi la tenilon al muro.

Tia reklamilo kostas nur 115:-- Sendkosto aldoniĝas. Mendu ĉe Esperanto-Centro en Stokholmo.

ALU-inoj ĉe Esperanto-Centro

La ŝtato prenas kaj donas. Ankoraŭ validas la favora regulo, ke asocioj kiel nia povas "dungi" senlaborulojn por ses monatoj. Tio kostas nenion por SEF.


Ek de kristnasko deĵoras du diligentaj kaj afablaj virinoj ĉe Esperanto-Centro en Stokholmo. Ili estas Gunilla Thölin kaj Bodil Hallmert, kaj ili laboras plentempe kvin tagojn semajne. Ambaŭ havas intereson lerni nian lingvon kaj ili jam montris, ke ili kapablas skribi leterojn en esperanto – senerare!

Iun tagon venis letero el Litovio. Iu volis aĉeti biblion. Ĝuste tiam ni ne havis bibliojn en stoko, kaj mi rekomendis al Bodil kaj Gunilla skribi tion. Ili verkis tre bonan respondleteron kun ĉiuj akuzativaj finaĵoj en ĝusta loko.

Rom

Rom

Bodil Hallmert kaj Gunilla Thölin ekdeĵoris en EC en decembro. Gunilla intertempe jam trovis novan laboron kaj finis ĉe ni.



eurolines

SWEDEN AB

Europe's Express Coach Network

Europa kånns närmare och närmare. Med Eurolines kan du ta dig till ett stort antal orter i Europa med buss.

Prisexempel:

Stockholm - Amsterdam fr. 1455:- T/R
Göteborg - Amsterdam fr. 1190:- T/R
Stockholm - Prag fr. 1240:- T/R
Göteborg - Prag fr. 1110:- T/R

10% rabatt till deltagare i UK-Prag vecka 30.
Erhålls endast vid direktbokning hos Eurolines.

Bussluffarkort

30 dagar fr. 2275:-
60 dagar fr. 2775:-

Flera avgångar i veckan till ett 50-tal storstäder i Europa. Enkel resa eller T/R.

Beställ våra nya tidtabeller nu!

- | | | |
|-----------------------------------|------------------------------------|------------------------------------|
| <input type="checkbox"/> Holland | <input type="checkbox"/> Estland, | <input type="checkbox"/> Danmark |
| <input type="checkbox"/> Polen | Lettland & | <input type="checkbox"/> Schweiz |
| <input type="checkbox"/> Spanien | Litauen | <input type="checkbox"/> Tjeckien |
| <input type="checkbox"/> Italien | <input type="checkbox"/> Kroatien | <input type="checkbox"/> Paris med |
| <input type="checkbox"/> England | <input type="checkbox"/> Frankrike | Disneyland |
| <input type="checkbox"/> Tyskland | <input type="checkbox"/> Belgien | |

TEL. 020-98 73 77

EUROLINES • KYRKOĜATAN 40
411 15 GÖTEBORG • FAX 031-13 20 51

**IDO: ĈU
"NECESA"
SUFIKSO?**

Esperantistoj scias, ke IDO estas planlingvo, kiu iam konkurencis kun esperanto. Svedoj scias, ke IDO estas kloteta seĝo de la sveda firmo IDO.

La firmo estas malnova kaj neniu scias plu pri la origino kaj kaŭzo de la nomo. Oni vokis min por informiĝi pri la vorto, sed mi nur povis bedaŭri, ke mi ne scias ĝian historion.

Estas tamen konate, ke la firmo iam estis parto de pli granda entrepreno. Do, temas pri elbranĉiĝo. La origina entrepreno naskis memstaran idon, kaj ĝi ricevis la nomon IDO.

Nu, kiu inventis la nomon? Ĉu esperantisto aŭ ido-isto? Ŝajnas al mi, ke estis esperantisto, kiu proponis la nomon IDO pro la oportuna signifo de la sufikso.

Ĉu vi scias ion? Informu nin!

Rom

Kelkloke mankas intereso – aliloke mankas instruistoj

Kelkaj kluboj faras reklamon por kursoj, sed neniu anoncas sin por partopreno. En la granda urbo Gotenburgo venas spontanaj demandoj pri kursoj, sed tie ne troviĝas instrupretaj esperantistoj!

En Skövde okazis dutaga kurso en oktobro kun ĉ. 35 partoprenantoj. La klubo denove kolektis interesitojn por dutaga kurso komence de marto. Ili pruntis Lars Forsman de Karlskoga por instrui.

Oni ne devas esti sperta esperantisto por gvidi studgrupon, memoru, ke ĉiu sperta kursgvidanto iam gvidis kurson por la unua fojo.

"Mazi en Gondolando" estas unu el pluraj eblaj helpiloj, kiujn oni povas uzi, kiam oni gvidas kurson por komencantoj. Karaj klubkasistoj – investu monon en Mazi-vidbendojn! Pruntedonu poste la vidbendojn al diversaj instruistoj en via regiono kaj petu ilin komenti pri la pedagogia valoro, kaj simile.

Esperanto-Centro havas kelkajn Mazi-pakaĵojn (du bendoj, lernolibro) kaj volonte vendas ilin por vasta utiligo.

La stokholma "Kunlabora komitato" aranĝis la kvaran dutagan kurson en la daŭro de unu jaro. Tio funkcias bone kaj oni planas pliajn kursojn (vidu anonceton ĉi-apude). Estas kursoj en tri niveloj: por komencantoj, dua paŝo kaj konversacio. Averaĝe venis 25 personoj ĉiun fojon. Entute partoprenis 45 ko-

mencantoj, inter ili pluraj gejunuloj. Vi certe komprenas, ke oni volas daŭrigi.

La estraro de SEF estas nun finverkanta la jarraporton pri la agado dum 1995. Vi certe komprenas, ke ni bezonas viajn raportojn pri la kursagado. Ni volas ankaŭ scii pri manko de kursoj, kaj la eventualan kaŭzon. Mi deziras vere prezenti plenan kaj fidindan raporton pri la kursaktivecoj en Svedio en nia jubilea kongreso en Katrineholm. Helpu nin!

Roland Lindblom

Tvådagarskurs i Stockholm

Fortsättningskurs
(lägre nivå)

Fortsättningskurs
(högre nivå)

20–21 april

Lokaler: Fältöversten,
Valhallavägen.

Förfrågningar:

Nils-Erik Kristoferson,
tel. 08-664 71 82

Känner du också att du ibland skulle behöva slå upp och se efter hur det egentligen ska heta? Kanske är det någon som frågar dig – du kan svaret, men vill ha stöd av boken när du förklarar hur esperanto fungerar.

Bertil Wennergrens

Nya Esperanto- kompendium

är en modern grammatik. Den är lättfattlig, särskilt lämplig för dem som inte hemvant rör sig med grammatiska begrepp. Boken innehåller alla basfakta, även reglerna för uttal och ordbildning.

Beställ ditt exemplar från Esperantoförlaget, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm, för bara 120 kr + porto. Eller låt esperantoklubben beställa minst tre exemplar och få "libroservo"-rabatt. Gör det nu, så blir det gjort.

Al la fiŝo ne instruu naĝarton.

[ETT ORDSPRÅK PÅ ESPERANTO SATT MED TYPSNITTET GRIFFO CLASSICO. TECKNAT AV FRANKO LUINI 1993]



OMNIBUS TYPOGRAFI: Formgivning, fotosättning och rippning.
Produktion av allehanda trycksaker på svenska, esperanto
och andra språk.

OMNIBUS · BOX 135 · 135 23 TYRESÖ · TEL. 08-742 83 36 · FAX 08-712 39 93 · FRANKO@OMNIBUS.SE

ETT BISTÅNDSPROJEKT

MARGĜENE

Esperantistoj, anoj de biblia studrondo en Minsk deziras kontakton kun kristanoj (prefere evangeliaj, sed ne nepre) kaj akceptus donace librojn por la ĵus fondita "Biblioteko Jesuo".

Aleksy Tolmachov,
P.O.Box 386,
Minsk 113,
BY-220113 Belarus
CIS
Fakso: 00375-172-629124

...
Finna fotisto kaj fraŭlo (46) deziras korespondi kun svedaj esperantistoj.

Esko Kannas,
Pohjolank 33B32
FI-87100 Kajaani
...

36-jara franco kun fotista diplomo kaj emo ludi ĵazgitaron serĉas gekorespondantojn por plibonigisian lingvokonon. Bernard Speggiarin,
92 avenue de Montredon
F-13008 Marseille,
Francio
...

40-jara Vitalija el Litovio sopiras al leteroj de svedaj esperantistoj. Ŝi laboras en malsanulejo kaj interesigas pri geografio. Vitalija Geluceviĉiene,
Daugai, Naujoj 20,
Alitaus raj, Litovio.
...

Latvo (59) kun intereso pri sveda historio, precipe el antikva tempo. Interesigas pri sportoj kaj heksagonŝako. provis lerni la svedan. Konrad Ločmelis,
P.n. Demerova,
LV-4588 Balvu raj,
Lettland.

Bistå grannarna i Litauen

Litova Stelo är en tidskrift av mycket hög kvalitet som ges ut i Litauen. Redaktionen finns i samma hus som Esperantoförbundet i Vilnius, det hus som var Zamenhofs svärföräldrars bostad.

Tidskriftens hela innehåll är på esperanto. Den behandlar esperantospråkliga frågeställningar, rörelsens historia och utveckling samt Litauens historia och kultur, för att nämna några av de viktigaste ämnena. En betydande del av upplagan sprids internationellt. En fördel är att prenumerationspriserna är rimliga också i de f.d. "socialistländerna", där tidningar från väst kan vara alltför dyra.

Till *Litova Stelos* problem hör den bristfälliga utrustningen på redaktion

nen – liksom på förbundets kontor i övrigt. Gamla handdrivna skrivmaskiner är det modernaste. En ordbehandlare skulle göra stor nytta.

Inom Tyresö Esperantoklubb har ett par medlemmar lovat skänka en, visserligen begagnad men ändå rätt modern och fullt användbar persondator med skrivare. Den behöver dock förses med program, bl.a. en esperantospråkig ordbehandlare. Dessa kostar omkring 1500 kronor.

Vidare ska utrustningen transporteras och redaktionen instrueras. En av medlemmarna (med vana att utbilda redaktionspersonal) har lovat att resa och ordna detta. Men var finns de tusen erforderliga kronorna?

Bidrag till detta lilla men värdefulla biståndsprojekt kan sändas till Tyresö Esperantoförening, postgiro 82 26 64-9. Klubben revisorer kontrollerar projektet. Även minsta bidrag är välkommet.

NEKROLOGO

Ivar Paulsson

el Solna, aktiva kaj sindona esperantisto-filatelisto, prezidanto de la internacia E-filatela klubo AREK, mortis la 10-an de decembro en la aĝo de 80 jaroj. Dum pli ol 40 jaroj li estis energia kolektanto de diversaj E-filatelaĵoj kaj laboris por ke tiaj historie interesaj objektoj estu konservitaj. Li lerte gvidis la klubon AREK ek de la starto antaŭ 27 jaroj, multe korespondis, malavare helpis novulojn, plurfoje vizitis kolektantojn en diversaj landoj kaj dum la lastaj jaroj ankaŭ aranĝis E-filatelaĵajn renkontiĝojn dum internaciaj kongresoj.

Lia modesta kaj tutverda personeco donis al li multajn geamikojn en la tuta mondo. Ni kolektantoj ege bedaŭras lian forpason kaj ĉiam dankeme memoros lin.

A-G Strönne

Esperanto ĉe la Mediteraneo

Se vi volas kombini lernadon de esperanto kun banado en la Mediteranea maro, jen du okazoj ĉi-somere:

1. Esperantorestado kun diversnivelaĵ esperantokursoj okazos en la feriejo "Batipaune" ĉe la Mediteranea marbordo de la 12-a ĝis la 16-a de junio 1996. Informojn donas Cercle Biterrois d'Esperanto, 9, rue Georges Picot, F-34500 Beziers, Francio.
2. Internacia esperantosemajno kun 3-nivelaĵ kursoj okazos en la feriejo "Le Lazaret" en Sete (Hérault) de lundo la 9-a ĝis lundo la 16-a de septembro 1996. Jen bonega okazo por bani sin en la Mediteranea maro, en internacia etoso, lerni la internacian lingvon, por ripozi kaj viziti tre agrablajn regionojn. Informas Centre Culturel Esperanto de Montpellier, 5, rue du Docteur Roux, F-34000 Montpellier, Francio.

Examen

Svenska Esperantoinstitutets skriftliga översättningsprov för högre och lägre examen i esperanto arrangeras på olika platser söndagen den 12 maj 1996. För information och anmälan kan kursledare eller enskilda intresserade kontakta Ebbe Vilborg, Prästgårdsängen 2, 412 71 Göteborg, telefon 031-40 52 74.

DONACOJ

Åke Näsholm,
Sundsvall, "memore al Erik Svärd, Malmö" 200 kr
Hans Hjortzberg-Nordlund, Särö, 100 kr


KLUBO CENT

Anna-Greta kaj Jan Strönne, Malmö, 200 kr
Esperantoklubo La Guto, Ljungby, 200 kr
Reimar Adler, Lyckeby, 100 kr
Rune Ekmark, Sandviken, 100 kr

SEF kore dankas pro la donacoj. Pliaj donacoj estas bonvenaj je pĝ 20 12-3, Esperantoförbundet.

Preparu vin por Prago!

Lernu la plej kutimajn ĉehajn vortojn jam antaŭ via ekveturo al UK.



240-paĝa poŝvortaro – nur 110 kr
Sendkostoj aldoniĝas.

ELDONA SOCIETO ESPERANTO
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm
Tel. 08-34 08 00 • Fakso 08-34 08 10

Malmö Esperantoförening
Kronatorpsg 94
21227 Malmö

Esperantoförbundet, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

Heder åt den som vågar fråga

Vi som vet vad esperanto står och går för blev inte så hemskt förvånade över professor Berghs uttalande i "Fråga Lund" häromåret, då han påstod att esperanto saknar originallitteratur. Var det undanhållande av fakta eller ren okunskap?

Vi har vant oss vid att många "språkvetare" saknar elementära kunskaper om företeelsen esperanto, så jag blev glad för en månad sedan när docent Hans Karlgren, språkvetare och medarbetare i *Svenska Dagbladet*, kom med några frågor till SEF. En fråga löd: finns

det någon ordbok för esperanto till eller från svenska eller annat språk i Norden? Med svar från C Kiselman, E Vilborg och undertecknad borde docent Karlgren vetskap om esperanto ha fått ett ordentligt lyft. Heder åt den som vågar fråga!

Varje vecka får vi telefonförfrågningar om esperanto, och det är ofta unga människor kring 20 år. De flesta är studerande. Nyblivna pensionärer är en annan grupp som vill pröva på "det där med esperanto, nu när man fått tid". En del vill ha brevkursen, andra köper en

lärobok. Glädjande nog blir en del ganska snart medlemmar.

Ett lustigt sammanträffande uppstod i Göteborg nyligen. En nybliven pensionär och brevkursdeltagare tyckte tydligen att det var värt att nämna om brevkursen för en granne i trappan. Damen i fråga kunde då meddela att brevkursförfattaren var hennes pappa Ingemar Nordin!


Hjulstaskolans "spinoff"-effekt

Affärsprofilen är en tidning med redaktion i Täby. Man hade läst om Hjulstasklassen och esperanto, och ville ha något i sin tidning. Artikeln om esperanto kom som första artikel i tidningen och den ser mycket trevlig ut. Tyvärr har man hamnat avsevärt fel när det gäller tolk- och översättningskostnader för EU. Det står att det kostar 90 miljoner kronor! Om man vet att det finns drygt 3000 tolkar/översättare, att minimilönen är ca 40 000 i månaden och kan vara så hög som 84 000, så bör det snabbt kunna räknas fram, vilken ofantlig summa pengar det rör sig om, bara lö- nerna.

Under 1995 lämnade vi ut informationsmaterial till fyra journaliststuderande för specialarbete om esperanto. En av dessa blev upphovet till artikeln om klassen i Hjulsta, den som kom i *Metro*.

Roland Lindblom

KRUCVORTA ENIGMO 96/1



Horizontale

- 1 Kvinpinta stelo
- 2 Senfina – Fiŝkaptil'
- 3 Alia nom' de Japanio – Iom dika paperpec'
- 4 Rilata al serio de muziknotoj – Rilate al floro
- 5 Iamaniere – Mallongigo de Unuiĝintaj Nacioj
- 6 Sofo – Prepozicio
- 7 Japana dram' – Ĉarmaj
- 8 Postvivaj' de homo – Proksime al domo (radiko)
- 9 Oficiro
- 10 Protestis

Vertikale

- A lama edukejo por knabinoj
- B Karteton
- C Azia lando – Instrumento
- Ĉ Kobold' – Virina organ'
- D Nomo por knabino – Korinklin' – Ne vi
- E Komenco de galo – Estas sola en sia speco
- F Ke ili silentu estas nia deziro
- G Rakonto de historiaj faktoj – Foje kuracilon
- Ĝ Atlantiko – Havas idon
- H En la oreloj – Frakci'

SOLVO DE 95/6

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ	H
1	K	A	P	I	S	A	N	A		
2	P	A	R	A	D	O	K	S	O	N
3	A	R	E	N	O					
4	L	I	A	J						
5	A	K								
6	J	A	K							
7										
8	M									
9	O	R	T	A						
10	K	A	O	L	I	N	E	J	O	N



Lennart Persson

Esperantoförbundet

inbjuder till jubileumskongress i Katrineholm 1996.

Du anmäler Dig genom att använda nedanstående inbetalningskort. Ange på talongen vilka alternativ och dagar, som avses, och notera noga namn och adress.

OBS! Om Du betalar senast 15 april, är kongressavgiften endast 200 kr, därefter och fram till den 3 maj är avgiften 300 kr.

Har Du frågor om avgifter o dyl kan Du vända Dig till kassören: Nils Pettersson Tfn 011-335307

Avgifter Kategori Pris kr

Deltagaravgift

T o m 15 april	A	200
Efter 15 april	B	300
SEJU-medlem	C	100
En dag	D	150

Logi och alla måltider (ej utflykt)

Två nätter i dubbelrum	E	1280
Två nätter i enkelrum	F	1530

Avgifter Kategori Pris kr

Avgifter separat

SEJU-logi per natt	G	110
Dubbelrum m frukost per natt	H	400
Enkelrum m frukost per natt	I	525
Lunch - per styck	K	50
Kaffe - per styck	L	30
Middagar - per styck	M	120
Sallad fredag kväll	N	50
Bankett lördag kväll	O	250
Utflykt	P	135

OBS:

Totalkostnaden är lägre än förra året. Om Du tar hela paketet sparar Du dessutom 130 kr jämfört med separat beställning. Det motsvarar t ex två lunch och en kaffe!

Anteckna: vilken natt som avses (om Du bara har en övernattnig)
.. behov av rökfritt rum eller
.. vegetarisk mat!

 **POSTGIROT SVERIGE**
Meddelande till betalningsmottagaren

Härmed beställes följande markerade kategorier för 1996

Deltagaravgift A - B - C - D	Pris
Paketpris E - F	Pris
Natt: Fr-Lö / Lö-Sö G - H - I	Pris
Övrigt K - L - M - N - O - P	Pris
Gåva till kongresskassan	Kr
Sammanlagd	Summa
Specialbehov:	

Telefon nr:

INBETALNING/GIRERING A

Till postgirokonto nr 481 43 95 - 2	Avgift	PKS: OCR/Kod 1 PKM: 2 • Konto • Avg • Bel • Kassastämpel
Betalningsmottagare (endast namn) SEF Jarkongreso		
Avsändare (namn och postadress) Gäller för:		
Eget kontonr vid girering		
Svenska kronor	öre	

I DETTA FÄLT FÅR ANTECKNINGAR INTE GÖRAS - RESERVERAT FÖR POSTGIROT

#

#00#